# EKO 2025

Du gravaj novaĵoj

EKO 2025-28. Jun 30. Pezo: Word 40, PDF 500 KB, Sen alkroĉaĵo Sume 540 KB

## UEA havas prezidanton por la sekva periodo



La Elekta Komisiono de UEA por la mandato 2025-28 preparis listojn de kandidatoj por la Estraro kaj Komitato (komitatanoj C) de UEA. La brazila Esperanto-aktivulo Fernando Maia estas senalternativa kandidato por la ofico de la prezidanto de UEA. Legu pli en *La Ondo de Esperanto* https://sezonoj.ru/2025/06/uea-96/.

SMG nome de la EKO-komunikoj ĵus gratulis la novan prezidanton, kaj promesis la fortan subtenon por UEA tra la sekva periodo.

## La 111-a UK okazos en 2026 en Graz, Aŭstrio

Por la 111-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) la Estraro de UEA elektis Aŭstrion (https://eo.wikipedia.org/wiki/Aŭstrio) kiel kongreslandon. La bela Graz (Graco) (https://eo.wikipedia.org/wiki/Graz) estos la kongresurbo.

Graz estas la ĉefurbo de la provinco Stirio. Ĝia nomo devenas de la slovena vorto Gradec, kiu signifas "kasteleto". Ĝi estas la dua plej granda urbo en Aŭstrio (post Vieno) kaj havas kvar universitatojn kun ĉirkaŭ 40 mil studentoj. Kun pli ol 900 jaroj de ekzisto, en 2003 Graz estis la Eŭropa Kultura Ĉefurbo. Ĝi estas listigita kiel Monda Heredaĵo de Unesko kaj Urbo de Dezajno. Pro siaj turismaj vizitindaĵoj kaj oferto de gastronomia diverseco ĝi ankaŭ estas konata kiel la Ĉefurbo de Ĝojo. Graciplena urbo.

Jam frue estis komerca lernejo en Graz, kie oni instruis Esperanton. De tiam gastiĝis en la urbo pluraj Eo-eventoj, inter ili la Aŭstria Esperanto-Kongreso de 1913, 1926, 1949 (okaze de kiu la Aŭstria Poŝto eldonis poŝtmarkon kun verda stelo kaj la vorto 'Esperanto' kaj 2024. Ankaŭ la Internacia Junulara Kongreso de 1970 kaj la Jubilea Esperanto-Konferenco de 1987 (dum kiu Ivo Lapenna proklamis la malfondon de Neŭtrala Esperanto-Movado). Intertempe la Esperanto-klubo de Graz aktivas. En 2023 aperis oficiala 42-paĝa gvidilo de la urbo en Esperanto. Tiu gvidilo estas internacie senpage mendebla ĉe la Turisma Oficejo de la regiono Graz, pri kio raportis UEA.facila (https://uea.facila.org/loke/graz-r75). Graz havas placon nomitan *Esperantoplatz*.

Fonto: laŭ gazetara komuniko de UEA

## La bulteno de FIPLV kun intervjuo de Ahmad Mamduhi

La renoma bulteno de la Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj (FIPLV) aperigis intervjuon kun la prezidanto de ILEI. Klaku por legi tion: FIPLV Newsletter

Aperis nova kaj interesa artikolo en la retejon uea.facila.org, kiun prizorgas **Anna Lowenstein** kun siaj kunlaborantoj (https://uea.facila.org/kunlaborantoj/). La artikolon verkis **Vicente Sales** kun titolo **Mallonga historio de la malhumaneco**, kaj voĉlegis ĝin **Margaret Zaleski-Zamenhof**:

https://uea.facila.org/artikoloj/opinioj/mallonga-historio-de-la-malhumaneco-r480/

Sendis Ahmad Mamduhi, ILEI-prezidanto: https://www.ilei.info/

## Koncerto de Saŝa Pilipovic dum la kongreso de ILEI

Jen ligilo por via gustumado

https://drive.google.com/file/d/1joSjSsUhsab1p8hNee3BhKqC-Enp1k_X/view?usp=sharing

## Trejnado en Kongo DR

PANZI ESPERANTO-KLUBO, branĉo de la neprofitcela asocio COPROFER, daŭrigas sian batalon por konsciigi kaj disvastigi la lingvon Esperanto en la orienta parto de Kongo DR. La 8-an de junio la klubo okazigis sian plej novan trejnan sesion. Por tio, certaj lokaj aŭtoritatoj kaj loka radiostacio estis invititaj partopreni kaj kunlabori por antaŭenigi Esperanton en Kongo. Vi povas sekvi ĉi tiun raporton ĉe la radiostacio Watoto News. Por antaŭenigi ĉi tiun iniciaton kaj atingi ĉi tiun celon, COPROFER-PEK petas vian financan, materian kaj moralan subtenon.

https://watoto.news/actualite/2025/06/11/bukavu-esperanto-un-pont-vers-le-monde-pour-les-jeunes-de-panzi/



## Brazila muziko

Jen bela kanto de **João Bosco** kaj **Capinam**, nome Muldokarton' (originale *Papel machê*). Ĝi partoprenis la muzikon de televidserio ĉe TV Globo:

## Brno atendas la kongresanojn



Antaŭ la 110-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu komenciĝos la 26-an de julio en Brno (Ĉeĥio), *Ondo* dissendis komunikon pri kelkaj kongresaj ĝisdatigoj. Legu ĝin ĉe https://sezonoj.ru/2025/06/brno-24/. Aliĝis ĝis la 30-a je junio 1030 personoj el 62 landoj.

## Blinduloj kongresas en Francio

La 89-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj, okazos en Greziljono (Francio) ekde la 30-a de Junio. Samloke kaj samtempe okazos 9-a Maratona Esperanto-kursaro kaj 37-a tritaga Internacia Eo-Konferenco IEK.
Elementan kurson gvidos Frank Lappe (Germanio). La instrua lingvo estos Esperanto ekde la unua tago. dum la kurso oni ludos kaj spektos filmojn.

Mezan kurson gvidos Nedeljka Ložajić (Serbio) «Paroligo inter astroj». Celo de la kurso estas paroligi la kursanojn kaj riĉigi ilian vortprovizon pere de interagaj ekzercoj. Estos priparolataj temoj ekde la kulturaj, sociaj, popularsciencaj ĝis la movadaj.

Trigradan kurson gvidos Dennis Keefe (Usono, Ĉinio, Hispanio). Estos tuŝitaj pluraj temoj kiuj rilatas Esperanton laŭ vorta, gramatika kaj sintaksa vidpunktoj. Oni traktos plurajn literaturajn temojn, ekvidante multajn grandajn verkojn en Esperanto kaj historion de Esperanto, per ĝiaj gazetoj, utiligante vastan retan bibliotekon BitArkivo.org.

IEK-37: En la Internacia Eo-Konferenco vi povos aŭskulti jenajn prelegojn:
Otto Prytz: "karakterizo de la infinitivo ĝenerale kaj la Esperanta infinitivo speciale",
Violetta de Filippo: "Simone de Beauvoir: bonedukita junulino.
Nedeljka Loĵajiĉ: "Tradicia kaj scienca aliro al sonĝoj".

Oni povos partopreni praktikan kurson de Unua Helpo (sukurado), atelieron pri agrabla kaj afabla kontakto kun vidhandikapitaj personoj, ekscii pli pri diversaj Eo-aktivaĵoj ktp. Partoprenantoj de la evento havos eblecon promenadi en proksima parko por malkovri la lokan flaŭron kaj faŭnon. Estos organizataj pluraj turismaj vizitoj laŭ nia komuna interesiĝo al la apotekejo Baugé, kastelo *Le Lude*, dolmeno Pontigné, kastelo Montgeoffroy, ludejo Boule de Fort... Precipe ni rekomendas ekskursojn al Vera kruco, Muzeo de skulptaĵoj speciale alireblaj al vidhandikapitaj personoj.

Ĝis nun ne aliĝis pluraj nevidantoj, sed ni varme invitas vin aliĝi, promesante al vi abundan kaj interesan programon. Pri via aliĝo, partopreno en la programo kaj aliaj demandoj bonvolu skribi al:
kastelo@gresillon.org; nedeljkalozajic@gmail.com; sophie.renault761@gmail.com.
Pliajn informojn vi povas trovi en la retejo de Greziljono: https://gresillon.org

## Koncerto de Nedeljka Ložajić kaj Uroš Martinović

Tio okazos en la ILEI-kongreso 2025 en Beogrado.
https://drive.google.com/file/d/1plTCYQCN1qa9aVPyf1wr93TZzBYKzC7I/view?usp=sharing
Aliĝu kaj ĝuu ilian kantadon kun akompano de gitaroj!
Dum la kongreso atendas vin ankaŭ belegaj tuttagaj ekskursoj tra Serbio!
En ilei.info vi trovas ĉiujn ligilojn: https://www.ilei.info/

## ILEI agas vere tutmonde

Aperis bita eldono fare de ILEI de la verkaro de Itala kuracistino Antonietta Bernardoni en la ĉina kaj Esperanto. Ĉinigis studentoj kaj instruistoj de Zaozhuang-a Universitato. Jam eldoniĝis ankau la papera versio, pli bela, ĉiam fare de ILEI.

https://www.ilei.info/agado/Antonietta%20Bernardoni%20%20Esperante%20kaj%20cxine.pdf



Alessandra Madella

## Komercistoj aŭdas pri la movado Rotary

La 222-a Dimanĉa Kunveno de IKEF temis pri la humanitara movado *Rotary*, laŭ informoj de Ursula Grattapaglia el Brazilo.

## Kanadaj esperantistoj kune



La 20-a Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto (MeKaRo) okazis mezmaje 2025 en Otavo, la ĉefurbo de Kanado. Legu prian artikolon en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* https://sezonoj.ru/2025/06/kanado-3/.

## La somera solstico

Precipe en Norda Eŭropo oni ĉi-tempe festas la Somermezon (ankaŭ konatan kiel la Johana tago). Ekde miaj infanaj jaroj ĉi tiu libro de Tove Jansson, verkita por kaj infanoj kaj plenkreskuloj, estas por mi tiu verko, kiu plej bone kaptas la magion de la norda Somermezo, kun multa originala fantazio kaj humuro. (Ĉe Amazon aŭ Adlibris serĉu per ”jansson somermeza”.) -- Cetere, en pli suda Eŭropo oni ofte konsideras la someran solsticon la komenco de la somero, ne la mezo.

Jouko Lindstedt

## Onda inundo

Ekde la 1-a de januaro 2020 ĝis la 22-a de junio 2025 dum du mil sinsekvaj tagoj en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* ĉiutage aperas almenaŭ unu nova teksto. En la retejo jam aperis 4051 tekstoj, kiujn garnas 5308 ilustraĵoj. Legu pli pri la retejo kaj vidu la liston de la 15 plej legataj tekstoj ĉe https://sezonoj.ru/2025/06/ondo-144/.

## Recenzo pri Venzo



Seula Esperanto-Kulturcentro havas regulan zoom-renkontiĝon en ĉiu dua vendredo dufoje monate. La 58-a Venzo (Vendreda Zoomo) okazis en la 27-a de junio En tiu ĉi Venzo, ni invitos s-ron Sten Johansson (foto) el Svedio, kiu estas konata verkisto en esperantujo. El liaj verkaĵoj, 'Katrina-Serio' estas tre populara por komencintoj

## Financaj raportoj de UEA pretaj

En la komitata teko vi trovos la spezokonton kaj la bilancon 2024.
https://uea.org/l/teko/komitataj/Spezokonto_de_UEA_2024.pdf
https://uea.org/l/teko/komitataj/Bilanco_de_UEA_2024.pdf

Komentario de la Ĝenerala Direktoro aperos en posta EKO-komuniko.

## Aperas informoj pri APERo-18



La tradicia esperantista renkontiĝo APERo-18, dediĉita al la 30-jariĝo de MEA MASI, okazis komence de majo 2025 en Puŝkino, Rusio. Legu prian artikolon de Julia Mul (Aalen, Germanio) en *La Ondo de Esperanto* https://sezonoj.ru/2025/06/ruslando-64/.

========= vortoj: 1120 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**Dudek numeroj de 2025 aperis, kune kun la kvardek kvar numeroj de 2024**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.